

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2010

Vendredon la 15an de januaro

58a jaro

KVANKAM NI ĈIAM provas aranĝi aktualajn kaj interesajn membrokunvenojn, ni konstatas en la kluba estraro ke tamen venas nur la sama malgranda grupo. Mankas precipe junuloj kaj novuloj. Sed nun ni provos radikalan solvon: Ni invitas la junulojn mem aranĝi kunvenon! Tio okazos lundon la 15an de februaro (semajno 7). Ili planas la kunvenon unuavice por junuloj kaj novuloj, sed ĉiuj membroj bonvenos. Vidu cetere la kunvenkalendaron sur la ĉi-sekva paĝo.

***SELV OM VI ALLTID** forsøker å arrangere aktuelle og interessante medlemsmøter, konstaterer vi i klubbstyret at det likevel kommer bare den samme lille gruppen. Særlig de unge og de nye medlemmene utelir. Men nå prøver vi en radikal løsning: Vi inviterer ungdommen til å arrangere et møte selv! De lager møtet primært for unge og nye medlemmer, men alle er velkomne. Dette skjer mandag den 15 februar (uke 7). Se ellers møtekalenderen på neste side.*

KIEL fartas UEA? Ĉu venis la tempo por mastrumi nian internacian organizon alimaniere? Tion oni diskutas en internaciaj organoj kaj diskutlistoj. Ĉu membro-organizo ankoraŭ estas taŭga formo, aŭ ĉu plibonus loza reto? Ĉu UEA uzas tro da fortoj por administri sin mem? Ĉu la Delegita Reto kaj la Jarlibro havas utilon en nia retroŝta epoko? Ĉu la strukturo de landaj asocioj malstimulas kontakton trans landlimojn? – Nia temo 15 marto.

***HVORDAN GÅR DET med verdensforbundet?** Er tiden inne til å drive det på nye måter? Om det er det en del diskusjon i internasjonale organer og e-postlister. Er medlemsorganisasjon en brukbar form, eller ville det være bedre med et løst nettverk? Bruker UEA for mye krefter på å organisere seg selv? Hemmer strukturen med nasjonale organisasjoner samarbeid over landegrensene? Vi tar dette opp på møtet 15 mars.*

Kalendaro

(Ni komencas je la 19a horo. Kie? / Hvor? – vidu malsupre /nedenfor)

Lundon la 18an de januaro (semajno / uke 3 – mandag

Aktuala diskuto: pri la frontpaĝo de la tiutaga *Aftenposten*.

Aktuell diskusjon: om forsiden på dagens Aftenposten.

Lundon la 1an de februaro (semajno / uke 5) – mandag

Libera interparolado. Kun vafloj.
Venos gasto: fervojisto el Germanio.

Fri samtale. Med vafler. Vi venter en gjest – en jernbanemann fra Tyskland.

Lundon la 15an de februaro (semajno / uke 7) – mandag

La junularo preparos programon. Ni interalie aŭskultos Esperantomuzikon kaj manĝos picon. (Vd. ankaŭ la frontpaĝon.)

Ungdomsgruppen legger opp programmet. Bl.a. hører vi på esperantomusikk og spiser pizza. (Se også forsiden.)

Lundon la 1an de marto (semajno / uke 9) – mandag

ĜENERALA KUNVENO. Ni pri-traktos la agadon de la pasinta jaro. Malnetajn jarraporton kaj jarkalkulon ricevos la membroj antaŭ la kunveno.

ÅRSMØTE. Vi ser over fjorårets virksomhet. Forslag til årsrapport og regnskap får medlemmene tilsendt på forhånd.

Lundon la 15an de marto (semajno / uke 11) – mandag

UEA: leviĝis ideoj pri strukturŝanĝoj en nia internacia organizo. Vd. la frontpaĝon. Ni diskutos.

Verdensforbundet: Det har vært lagt fram ideer om strukturendringer. Se forsiden. Vi diskuterer.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

Ni bonvenigas ok novajn junulajn membrojn!

Ses el ili estas partoprenintoj de la semajnfina kurso kiun aranĝis NJE kaj la studenta societo fine de oktobro.

OKAZIS

Lundon la 2an de novembro

Rekorde malmultope ni provludis pedagogiajn ludojn, inkluzive de kelkaj kiujn ni mem inventis aŭ adaptis; kiuj taŭgas eĉ por tut-komencantoj. Kaj per tiu amuza ekzerco ni mem ankaŭ (re)lernis kelkajn (forgeŝitajn) vortojn.

Lundon la 16an de novembro

Otto Prytz donis sisteman prezenton de la historio de la brajla skribo kaj ties adapto por aliaj alfabetoj kaj muziknotoj. Jam kiel junulo Louis Braille frue en la 19a jarcento elpensis la bazan 6-punktan alfabeton, kiu ankoraŭ estas uzata hodiaŭ. Sed pri la interpunkciaj signoj kaj la specialaj literoj de diversaj lingvoj oni uzis malsamajn kodojn en diversaj landoj dum jarcento, en matematiko kaj pri kelkaj signoj eĉ ĝis hodiaŭ, ekzemple la @ aŭ la eŭro-signo, kiujn oni ankoraŭ ne sukcesis normigi internacie.

Otto disdonis ampleksan paperan tekston en la norvega (16 p A4 inkl. plurajn tabelojn). Restas pluraj kopioj en Esperantonia.

Ĉeestis pli da membroj kaj gastoj ol kutime, kaj sekvis vigla demandado. Ni ankaŭ aŭdis novaĵojn el Bergen kaj Hamar (la biblioteko de NEL) kaj de la junularo, kiu ĵus aranĝis semajnfinan kurson varbante ses novajn membrojn.

Lundon la 7an de decembro

Amason da postlasitaj notaĵoj, poŝtkartoj kaj leteroj de Bruno Riefling alportis lia nevino Monica Lund (ankaŭ konata kiel la patrino de Marianne, kiu nun de multaj jaroj loĝas en Tromsø kun E-familio). Ni aŭskultis kun miro la rakontojn el ora epoko kiam homoj venis centope al E-kursoj kaj milope reagis al alvokoj, kaj kun ĝuo la fantaziplenajn lingvaĵojn de la juna Bruno (– la Norda Kabo kiel limo inter fino kaj senfino!). Sed temis ankaŭ pri milito kaj morto – de Zamenhof en 1917 kaj de Bruno mem la postan jaron, pro la hispana gripo.

Lundon la 14an de decembro

En la antaŭvespero de la 150-jara jubileo de Zamenhof ni interparolis pri lia ĉefa projekto, Homaranismo, kiu celis esti neŭtrala ponto inter la religioj same kiel Esperanto estu neŭtrala ponto inter la lingvoj. Estas strange ke tiu ideo tute ne vekis intereson ĉe liaj samtempuloj, kaj ke ankaŭ provoj relanĉi ĝin en la moderna epoko ĝis nun fiaskis, kvankam Zamenhof prezentis ĝin en la lastaj versioj kiel "spiritan azilon" por senkreduloj. Nun ni streĉe atendas la jubileo-jaran homaranisman kongreson en 2014!

Lundon la 4an de januaro

Malgranda kunveno, ĉar frue en la nova jaro. Ni rigardis la eblojn por ion

aranĝi kadre de la UN-jaro 2010 por proksimigo de la kulturoj, ekz-e kunlabore kun alia kaj pli forta organizo. Kaj Douglas raportis pri sia ĵusa agrabla restado en la E-kursejo en Lesjöfors, kun instigo utiligi kaj ĝui tiun mirindan insulon de Esperantujo.

Korekto: En la raporto en la lasta *Bulteno* pri la kunveno la 19an de oktobro ni menciis "la judan profeton Hillel". Pli taŭga vorto por karakterizi lin estas eble "saĝulo" (laŭ titolo de libreto pri li, de André Cherpillod).

DD

Har du lagringsplass hjemme?

Vi har i kjelleren her boklageret fra Esperantoforlaget, nå overtatt av klubben vår. Mye av dette er ikke ting som behøver å ligge akkurat her. Hvis noen kunne lagre noe av det hjemme, ville det frigjøre plass som trengs til mer aktuelle ting (f.eks. deler av Forbundets bibliotek, som snart må flyttes fra magasinet i Hamar bibliotek). Si fra til kontoret hvis du tror du har mulighet for å hjelpe.

En la Holokaŭstcentro en Bygdøy

prelegos dimanĉon 14 marto Bjørn Øyen kaj Douglas Draper pri Zamenhof, kies 150jara jubileo ni ĵus celebris en 2009. Je la 14a horo.

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? Vil noen leie møterom?

Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for en eller flere kvelder? Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

La klubo vendas librojn, insignojn, glumarkojn

Ekz-e la novan lernolibron de Stano Marĉek *Esperanto – direkte metode* (danan) kaj la klasikan *Fenomenet Esperanto* (50,-) ? Kaj la kolekton (2009) *Lingvaj paĝoj el Norvega Esperantisto*. Kaj multon pli. (Petu liston.)

Ni vendas ankaŭ ruĝajn glumarkojn (4 x 7 cm), por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj. Kaj insignojn / *jakkemerker* (verda stelo).

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).